



Jarkolekto : 2013

Numero : 2

Paĝo : 1

La Voĉo de Amikejo

Informilo pri *Senlime* kaj Esperanto en Eŭregiono Mozo-Rejno

Sendita al :

*Senlime*Esperanto-Asocio en Eŭregiono Mozo-Rejno
Avec le soutien de la Communauté française**En cas de non-distribution, renvoyer à**

H. Lentzen

Feldweg 20

BE-4701 KETTENIS

Tel. xx-32-(0)87-55.43.26

E-mail : lentzen@senlime.org**Editeur responsable****Responsa eldonanto +****Informoj en la franca lingvo:**

Tel. +32-(0)87/33.02.92

GSM +32-486-947.957

Mail: jacques@senlime.org

Esperantista Grupo de Verviers

J.-M. Jacques, 5 rue J. Wauters

BE-4800 VERVIERS

Informatie in het Nederlands**Informoj en la nederlanda:**

Tel. xx-31-(0)43-455.14.36

Mail: parren@senlime.org

P.H.H. Parren, Heimansstr. 16

NL-6285 AM EPEN

Informationen auf deutsch**Informoj en la germana:**

Tel. xx-49-2406-7809

Mail: hogen@senlime.org

K. Hogen, Auf der Pief 22

DE-52134 HERZOGENRATH

Aperas kvarfoje en jaro kaj**rete elŝuteblas ĉe****www.senlime.org****Prezroj por BE, NL kaj DE :****Unuopa n-ro : 4 EUR****Jara abono : 12 EUR**Bonvolu pagi, prefere antaŭ la
jarfino, **NUR** al la konto :**979-5327148-10**

IBAN : BE41 9795 3271 4810

BIC : ARSPBE22

(banque : Argenta)

de *Senlime*, 25 rue Pierre Fluche,
4800 VERVIERS, Belgio.La abono al la papera versio de nia
informilo (12 €) **NE** enhavas la
kotizon al *Senlime* (10 €).**ENHAVO :****p. 1 : *Senlime* dudekjara !****p. 2 : Niaj programeroj lupee****p. 3 : Eŭregiona kalendaro 2012-2013 (2/2)****p. 4 : Novaĵoj pri Amikejo kaj EMRo****p. 5 : La justic-palaco en Vervierso****p. 6 : Verviersa angulo**

Senlime dudekjara !

La unua kunsido de reprezentantoj de Eo-kluboĵoj en la Trilanda Regiono okazis dimanĉon la 31an de januaro 1993 de la 11a horo ĝis la 16a horo kunvoke de Marie DAENEN en Welkenraedt. Krom tiu-ĉi, ankaŭ ĉeestis Mia MARTENS, Annelies SOUREN, Trude SINNO, Mathieu SCHRYMECKER, Wolfgang BIENEN, Jean-Marie JACQUES, Benoit SCHEUREN kaj Uwe-Joachim MORITZ.

Ĉiuj konsentis, ke utilis krei kunordigan komitaton en kiu estu membroj reprezentantoj de Limburgoj (nederlanda kaj belga), de Lieĝa provinco kaj orienta Nordrejn-Vestalia (tio estas de la kvar subregionoj de Eŭregiono Mozo-Rejno). Ili do devas esti konsideritaj kiel fondintoj de *Senlime* (kvankam tiu nomo jam ne estis elektita).

La du sekvantaj kunvenoj respektive okazis en Vaals, la 21an de marto, kaj en Wijlre, la 31an de majo. Dum tiu-ĉi kunveno jam estis priparolitaj projekto pri aliĝilo, statuto kaj regularo, kalendaro de estontaj Trilandaj Renkontiĝoj kaj nomo de la asocio.

Dum la sekvontaj kunvenoj, la demando pri la elekto de komuna kunvenejo sin metis. Pro la iompostioma malapero de la esperantistaj grupoj en Nederlanda Limburgo kaj la iama ekzisto en Kelmis de Amikejo (esperantista ŝtato kreita sur la teritorio de Neŭtra-Moresneto, la elekto de la Select en kelmis – tre proksima de la «trilanda punkto», de Vaals, Aachen... kaj de la gravita centro de la eŭregiono Mozo-Rejno – sin trudis...



Niaj programeroj lupee

detaloj pri anoncitaj prelegoj, vesperoj, festoj,...

Irlanda fluto

En Irlando dum folkloraj festoj la fluto neniam mankas.

Penny whistle estas la nomo per kiu oni nomas ĝin ĉar la fluteto estas akirebla *por nur unu penco* (esprimo kiu diras : malmulte-kosta).



Penny whistle (irlanda fluto)

Post la prezentado de la blovinstrumento sekvas kelkaj klarigoj pri la lernmetodo.

Gravas komprenigi al la geaŭskultantoj ke la ludeblecoj de tiu-ĉi malgranda fluto ne estas senlimaj.

Antaŭ la aŭdigo de pluraj bonkonataj kantoj kaj melodioj perflute luditaj, la geĉeestantoj, dank'al sortimento da diversaj flutoj, havos okazon kompari, komenti kaj aŭdi la flutajn sonojn en malsamaj tonaloj.

03-15 20h00 BE-Kelmis, Select: "Prezento de la Irlanda fluto" far' Mathieu **Schrymecker**.
Inf. jacques@senlime.org

La Verviersa justicpalaco

Pri la Verviersa justicpalaco, legu nian artikolon sur la paĝo 5.

04-19 20h00 BE-Kelmis, Select: "La simboloj de la Verviersa justic-palaco".
Prelego de José **Jacob**.
Inf. jacques@senlime.org

La franca, stulta lingvo

Didier **Lousberg** kiel multaj el ni lernis esperanton jam en sia junaĝo kaj poste iĝis instruisto. Post kelkaj jaroj «en politiko», li retrovis la lernejon kaj nun instruas (do, ankaŭ la francan) en Verviers-a unuagrada lernejo.

Alfrontante multajn nebelgajn infanojn, li konstatis ilian malfacilecon lerni nian lingvon. Li zorgeme klopodis faciligi ilian laboron, laŭeble – por komenci - reduktante la malfacilecon de la lingvo.

Li tiam alvenis al la konkludo, ke li iom post iom estis ekkreanta kvazaŭ-artefaritan francan... iom simila al esperanto. Sed kial rekonstrui esperanton ?

Ofte li ridigis nin per rimarkoj koncerne la strangaĵojn de la franca. Ĉi-vespere li iele sintezigos siajn ideojn... kaj konkludos.

05-17 20h00 BE-Kelmis, Select: "La franca, stulta lingvo", prelego de Didier **Lousberg**.
Inf. lousberg@senlime.org

Karaoke-o de Senlime

Estas nun konate (ĉu ne ?) ke **Senlime** regule organizas sian propran karaokeo-n en Kelmis, fine de junio, agrabla maniero ĝisrevidi fine de la lerneja jaro. Kelkajn himnojn ni ankaŭ kelkfoje kantas okaze de festoj kiel la Zamenhofa en decembro, k.t.p.

Karaoke kompreneble ne havas nur ludan celon, ĝi ankaŭ havas grandan kulturan valoron, se oni konsideras ke ĝi permesas konatigi eksterlandajn kantojn (kaj tiele kulturon) enlande... kaj inverse.

Sed eĉ plie ni povas konatigi la esperantistan kulturon kaj lingvon al neesperantistoj. Tiel karaokeo fariĝas lingvo-instruilo.

Senlime (J-M Jacques) produktas siajn proprajn karaokeojn per la softvaroj Karakan (por **vanBasco**) kaj **karafun**-igilo sed vi ankaŭ povus trovi multajn karaokeojn en esperanto en la vasta ttt-ejo de «**ALLS**» per la stranga adreso : http://www.ophicinadigital.com/all/s/ak_karan.htm

Por partopreni, ne gravas ĉu vi bone kantas aŭ ne, nur necesas bonhumoro kaj toleremo. Ni kutime kune kantas, sed eventuale vi ankaŭ povas proponi vin por individua prezento ! Vi kiel kutime rajtos laŭplaĉe elekti kelkajn kantojn el la ĉiam pli kaj pli vasta kolekto.

06-18 19h30 BE-Kelmis, Select: karaokeo de **Senlime**.
Inf. lousberg@senlime.org

ESPERANTO

Eŭregiona kalendaro 2012-2013 (1/2)



Senlime publikigas, por siaj membroj, agendon pri la esperanto-aranĝoj en la Eŭregiono Mozo-Rejno. Ĝi aperas rete kaj papere.

« Trilandaj renkontiĝoj » estas organizitaj de kiu ajn esperantisto aŭ esperanto-grupo en Eŭregiono Mozo-Rejno interkonsente kun la komitato de **Senlime**. Principe ili okazu dufoje en jaro (printempe kaj aŭtune), laŭvice en ĉiu el la tri landoj (BE, DE, NL).

Tiu-ĉi agendo eventuale povas enhavi programerojn de lokaj grupoj aŭ aktivaĵojn organizitajn aŭ subtenitajn de komitatanoj. Ĝi neniel iĝu kompleta kalendaro de esperanto-aranĝoj (aliaj ekzistas).

La Kelmis-aj kunvenoj de la grupoj de **Senlime** nun regule okazas ĉiun trian vendredon de monato en kulturcentro "Select", Lutlicherstr. 264.

Por kiu ajn propono pri kunlaboro, ĉiam ege bonvena kaj atendata, bonvolu kontakti, prefere rete kaj kiel eble plej frue, la responsulon pri la kalendaro: Jean-Marie **Jacques** (jacques@senlime.org).

01-18 20h00 BE-Kelmis,
Select: konversacia tablo.
Inf. jacques@senlime.org

02-15 20h00 BE-Kelmis,
Select: konversacia tablo.
Inf. jacques@senlime.org

03-15 20h00 BE-Kelmis,
Select: "Prezento de la
Irlanda fluto" far' Mathieu
Schrymecker.
Inf. jacques@senlime.org

04-19 20h00 BE-Kelmis,
Select: "La simboloj de la
Verviersa justic-palaco".
Prelego de José **Jacob**.
Inf. jacques@senlime.org

05-17 20h00 BE-Kelmis,
Select: "La franca, stulta
lingvo", prelego de Didier
Lousberg.
Inf. lousberg@senlime.org

06-21 20h00 BE-Kelmis,
Select: Karaoke en esperanto
Inf. jacques@senlime.org



FESTO 2013 ("Festa Esperanto-Semajno Terure Organizita") okazos en Kelmis, de la 11-a ĝis 18-a de Aŭgusto. Temas pri muzika festivalo kies programo estas organizita de EUROKKA. Vidu la ttt-ejon: <http://festo.jefo.fr/> (programo sekvos...).

18-01 20h00 BE-Kelmis,
Select: table de conversation.
Inf. jacques@senlime.org

15-02 20h00 BE-Kelmis,
Select: table de conversation.
Inf. jacques@senlime.org

15-03 20h00 BE-Kelmis,
Select: "Présentation de la
flûte irlandaise" par Mathieu
Schrymecker.
Inf. jacques@senlime.org

19-04 20h00 BE-Kelmis,
Select: "Les symboles du
palais de justice de Verviers".
Conférence de José **Jacob**.
Inf. jacques@senlime.org

17-05 20h00 BE-Kelmis,
Select: "Français, langue
idiote", conférence de Didier
Lousberg.
Inf. lousberg@senlime.org

21-06 20h00 BE-Kelmis,
Select: karaoké en espéranto.
Inf. lousberg@senlime.org



FESTO 2013 aura lieu à La Calamine, du 11 au 18 aout. C'est un festival musical dont le programme est organisé en collaboration avec l'association de musique rock EUROKKA. Voir le site internet: <http://festo.jefo.fr/> (le programme suivra...).

Novajoj pri **KELMIS-AMIKEJO** .

(el la ret-informilo de la Yahoo-Grupo «*Amikejo*»)

Agrokulturistoj

Kelmis kuŝas meze de agrokultura regiono. La 26an de novembro, jam je la 8h30, centoj da traktoroj el la Herva plataĵo kuniĝis sur la rondkruciĝo en Battice. Tie ili haltigis la trafikon kaj retrovis agrokulturistojn el Germanujo kaj Sankt-Vith (ĉefurbo de la germanlingva parto de Belgio). Je la 9h15 ili kune foriris al Bruselo por protesti ĉe la Europa Komunumo kontraŭ la tro malalta prezo de la lakto.

Euregia televido

La 9an de decembro jam aperis la kvara elsendo de nova serio **ViaEuregio**, malfermita pordo al tiu et-europo ariganta 5 milionojn da enloĝantoj en Germanujoo, Nederlando kaj Belgio.

La diversaj elsendoj restas videblaj, interalie, ĉe youtube (<http://www.youtube.com> - serĉu "Via Euregio") kaj ĉe **Televesdre**, kun franclingvaj surtekstoj, je <http://www.televesdre.eu/site/via-euregio-1-999-261.html>.

Ludwig GOEBBELS eklaboris

La 17an de decembro, okazis la unua kunveno de la nova urba konsilantaro de Kelmis, prezidita de la nova urbestro, Ludwig GOEBBELS. Kvankam la oficiala lingvo en Kelmis (germanlingva urbo de Belgio) estas la germana, kaj kiel anoncote de la urbestro dum la starigo de la konsilantaro, la lingvo uzita estas la "platt", loka dialekto, kio donis familian karakteron al la kunveno.

Tio bonaŭguras por nia estonta renkontiĝo kun la urbestro, kiu eble akceptus niajn prioritatojn (1. la loka/gepatra lingvo kaj esperanto por ĉiuj -2. la "oficiala" lingvo por la "enlandanoj" - 3. kiu ajn alia lingvo bezonata).

Karnavalo

Jam en novembro okazis la "Ĝojan Alvenon" de Lia Moŝto la karnaval-princo kaj la pinto de la festo estos la lundo de la rozoj [Rozenmontag] kun la fama surstrata irantaro de la tradiciaj florimutaj ĉaroj.

Sed la karnavalo fakte komenciĝis la 7an de februaro per la ĵaŭdo de la virinoj, dum kiu tiuj-ĉi povas ĉion permesi al si. 1250 maljunaj virinoj el la tuta regiono invadis la ĉefajn stratojn de la urbo, drinkante, dancante, ĝoje kantante kaj ridegante.

Antaŭ la urbodomo ili renkontis la novan urberstron, Ludoviko GOEBBELS, kiu bonege ludis sian rolon. Taŭge ŝminkita (kaj ŝajne jam duon-ebria, sed pri tio ne klaĉu al iu ajn), li aperis meze de kvazaŭ-freneziĝintaj virinoj, kun nur duono da kravato: la alia duono laŭtradicie estis distranĉita de la festantinoj (kiuj emas tiuokaze forpreni tiun "seks-simbolon" de ĉiu pasanta viro).

La urbestro deklaris ke se oni ne estas "karnavalisto", oni ne estu urbestro de Kelmis! Pli poste li solene transdonis al virino la (grandegan) ŝlosilon de la urbo kaj ĝoje pretis ferii dum la resto de la festo!

Vidu la filmeton de **Televesdre** ĉe http://www.televesdre.eu/site/carnaval_2013_les_femmes_ont_pris_le_pouvoir_pour_un_jour_et_une_nuit_a_la_calamine-81303-999-89.html#.URUtHR12SiA



Komence de la video videblas la urbestro; la antaŭlasta parolintino (maldekstre) estas samideanino nia.

FESTO 2013

"*Festa Esperanto-Semajno Terure Organizita*" okazos en Kelmis, de la 11-a ĝis 18-a de Aŭgusto. Temas pri muzika festivalo kies programo estas organizita de **EUROKKA**. Multaj gejunuloj partoprenos kaj loĝos en la «**Patronage**», centre de Kelmis. Ili certe ĝojus tie renkonti vin (eĉ se vi tute ne konas esperanton... sed ŝatas la nunajn muzikojn).

Jen ankaŭ okazo pro malkovri la belegan regionon de la iama Moresneto, vizitante ekzemple la trilandan (tiam kvarlandan) punkton, marŝante de iama limŝtono al alia aŭ al la spuroj de la iamaj zink-minejoj, traŭrante la stratojn de la urbeto Kelmis kie plu videblas kontraŭoj el la epoko de **Amikejo** (sidejo de **UEA**, iama kultur-centro esperantista, domoj kaj tomboj de esperantistoj,...). Sen forgesi la lokan muzeon pri la rivero **Gueule**, kiu detenas multajn dokumentojn pri esperanto!

La Justic-palaco en Vervierso

La turismoficejo de la Verviers-a urbo publikigis franclingvan informilon pri «Verviers, pordo al belgia oriento», kiun la esperantista grupo de Verviers tradukis en esperanton.

Ni ĉi-tie reproduktas la paĝon koncernantan la justic-palacoon, sufiĉe interesa konstruaĵo pri kiu parolos al ni José JACOB dum vespera kunveno de Senlime en Kelmis.

Laŭ la belga sistemo, la «civilaj» konfliktoj pri malgrandaj monsumoj estas prijuĝitaj de tribunalo nomita «paca justico» dum pli gravaj aferoj kaj deliktoj estas pritraktitaj en tribunalo nomita «unua instanco» (ekzistas ebleco esti duan fojon juĝita en «apelacia kortumo», kaj eĉ eventuale nuligi juĝon de kasacia kortumo en Bruselo).

En Vervierso ne ekzistas apelacia kortumo (Verviers dependas por tio de la Lieĝa justico).

La justicpalaco en Vervierso donis sian nomon al la placo kie ĝi staras (kaj al la longa rektlinia strato inter la centra stacidomo kaj tiu placo). Temas pri konstruaĵo starigita dum la 19a jarcento de Verviersanoj, kiuj deziris tiel atesti pri la prospero de sia urbo.

Inter 1830 kaj 1850, la juĝejo de la unua instanco sidis en Hodimont, en eksa monaĝejo de la Enpensigulinoj. Kontraŭe la paca juĝejo sidis en la urbo-domo.

En 1853 estas finitaj la laboroj komencitaj sur la loko de la malnova monaĝejo de la Karmelanoj, por konstruo de justicpalaco kaj ĉela malliberejo. Ni ŝuldas al la Brusela arkitekto J. DUMONT la realigon de la malliberejo kaj parto de la palaco situanta vidalvide al la akademio pri belartoj (modeldesegnaĵa lernejo.

Komence, statuo de Temisa, diino de la Justeco, surstaris la palacon sed ĝi malaperis.



Temisa, justeca diino

La fasado estas ornamita per kvar statuoj de eminentaj juristoj, skulptaĵoj de Vilhelmo GEEF. Kiu estis tiuj eminentuloj ?

- Matias-Vilhelmo DE LOUVREX (Lieĝo, 1665-1734), ege famkonata kiel jurkonsilisto, estis skabeno kaj privata konsilisto de la Princepiskopo.

- Olivero LECLERCQ (Herve, 1761-1842) estis ĝeneralo prokuroro ĉe la Alta Kortumo de Lieĝo kaj ŝtatkonsilisto.

- Tuseno DANDRIMONT (1757-1822) estis la Unua Prezidanto de la Alta Kortumo de Lieĝo. Li estis justa kaj klera juĝisto.

- Karlo DE MEAN (Lieĝo, 1604-1674) verkis librojn pri civila Lieĝa rajto kaj pri juĝitaro en fremdaj landoj, kiuj estis poste pliriĝigitaj de DE LOUVREX. Li estis nomumita urbestro en 1646, sed li malakceptis pro la malamikeco de la partio «Grignoux» [grinju] kontraŭ li.

En 1894, la ĉela malliberejo estis malkonstruita kaj en 1896, alo prependiculara al la unua, kun fasado al la placo Janson kaj tura angulo estis arte aldonitaj al la origina konstruaĵo far' la arkitekto REMOUCHAMPS.

De 1939 ĝis 1991, flanke de la palaco staris preĝejo (St Jozefo) kiu rapide difektiĝis kaj tuj estis anstataŭigita de moderna anekso al la malnova konstruaĵo.

Nun ni, dank'al José JACOB, malkovru la (kaŝitajn ?) simbolojn de tiu palaco...

Verviersa **A**ngulo

Verviersa **E**speranto **G**rupo

Senlime a vingt ans !

Comité de V.E.G.:

Président: J. Jacob
19 Chemin de la Rostibouhaye
4910 POLLEUR (THEUX)
Tél. 087/22.10.79

Trésorier: D. Lousberg
25 Rue Pierre Fluche
4800 VERVIERS
Tél. 087/22.20.30

Secrétaire: J.M. Jacques
5 Rue Joseph Wauters
4800 VERVIERS
Tél. 087/33.02.92

V.E.G. dépend de l' Association pour
l'Espéranto (A.P.E.).
Secrétaire : Claude GLADY
cglady@arcadis.be
Tél. 071/64.49.16

Cotisations

Les espérantistes et sympathisants
sont cordialement invités à soutenir
notre programme d'action en versant
chaque année leur(s) cotisation(s) au
compte

979-5327148-10

IBAN : BE41 9795 3271 4810

BIC : ARSPBE22

(banque : Argenta)

de **Senlime**, 25 rue Pierre Fluche,
4800 VERVIERS, Belgio.

*Ce bulletin d'information peut être
intégré à la revue de APE
«Espéranto en marche», où vous
trouverez également les montants
des abonnements et cotisations à
APE et/ou UEA.*

*La cotisation pour **Senlime** reste
fixée à **10 Euros**.*

**Indiquez les nom, prénoms et
domicile du membre cotisant ainsi
que l'association bénéficiaire:
«cotisation de.... pour....».**

D'avance, merci à tous !

La première réunion de représentants de clubs espérantistes de la région des «rencontres (espérantistes) des 3 pays» [trilandaj renkontiĝoj] a eu lieu le dimanche 31 janvier 1993 de 11h. a 16h. sur invitation de Marie DAENEN a Welkenraedt. Outre celle-ci, étaient aussi présents Mia MARTENS, Annelies SOUREN, Trude SINNO, Mathieu SCHRYMECKER, Wolfgang BIENEN, Jean-Marie JACQUES, Benoit SCHEUREN et Uwe-Joachim MORITZ.

Tous se mirent d'accord qu'il était utile de créer un comité de coordination dont devaient être membres des représentants des Limbourg néerlandais et belge, de la partie ouest de la Rhénanie-du-Nord – Westphalie et de la province belge de Liège (c à d. des quatre sous-régions de l'Eurégion Meuse-Rhin). Ils doivent donc être considérés comme les fondateurs de l'association **Senlime** (quoique ce nom n'avait pas encore été choisi).

Les deux réunions suivantes eurent lieu respectivement a Vaals, le 21 mars, et a Wijlre, la 31 mai. Lors de cette réunion furent déjà discutés un projet de bulletin d'inscription, de statuts et de règlement, du calendrier des futures «Trilandaj Renkontiĝoj» et du nom de l'association...

Ensuite fut posée la question du choix d'un lieu de réunion. Vu la disparition progressive des groupes espérantistes du Limbourg Néerlandais et l'existence à La Calamine du site historique d'**Amikejo** (état espérantiste éphémère créé sur le territoire de Moresnet Neutre), le choix du Select – très proche du point des «trois frontières», de Vaals, Aachen... et du centre de gravité de l'eurégion Meuse-Rhin – s'imposa.

C'est donc désormais à La Calamine que se réunit le groupe espérantiste de Verviers, le plus important (en «zone d'activité») des groupes fondateurs de **Senlime**. Progressivement, c'est lui qui devint le moteur de ces réunions – comme des «trilandas» - et finalement les comités de **Senlime** et du groupe de Verviers devaient se composer des mêmes personnes (secrétaire général : Jean-Marie JACQUES ; trésorier : Didier LOUSBERG).

C'est la raison pour laquelle les réunions du groupe espérantiste de Verviers se déroulent en principe au Sélect à Kelmis, sauf quelques exceptions (fête Zamenhof,...). A la demande d'autres associations et à partir d'un minimum de 6 personnes intéressées, **Senlime** et/ou le groupe de Verviers organisent des cours dans ces deux villes.

Des cours d'espéranto sont également toujours disponibles par correspondance ou sur internet (et une nouvelle édition de l'**Assimil** sur l'espéranto devrait paraître prochainement). N'hésitez pas à nous contacter à ce sujet et pour tout renseignement utile.